

E Ŭ R O P A B U L T E N O

Sendependa esperantlingva ret-bulteno por informado kaj debato pri Eŭropa Unuiĝo

n-ro 21

18an de septembro 2002

Redaktas:

Umberto Broccatelli -

Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio

Via G. Brodolini 10 I-00139 Roma - Italio

u.broccatelli@iscalinet.it

-u.broccatelli@libero.it

tel./fakso +39-0687135019

Kasisto de EEU:

Hans ten Hagen, ten.hagen.esperanto@mxs.nl

UEA-konto de EEU: **eece-p**

Tiu ĉi retbulteno konsistas el du partoj: unu estas informilo pri *Eŭropa Esperanto-Unio* (**EEU-informilo**) kaj pri la eŭropa agado de la Esperanto-movado ĝenerale; la dua estas libera forumo pri temoj ligitaj al la procezo de eŭropa unuiĝo kaj al ties rilato kun la celoj de la Esperanto-movado (**Eŭropa debato**).

Kiu deziras ricevi ĝin, tiu sin anoncu al la ret-adreso *u.broccatelli@iscalinet.it*; same se oni ne plu deziras ricevi ĝin. Al la sama adreso oni sendu kontribuojn kaj reagojn. Dankon pro via atento



Esperi pri daŭrado de harmonio inter multaj ŝtatoj sendependaj kaj malligitaj, tio estus neglekti la unuforman iradon de la homaj okazaĵoj kaj kontraŭiri la sperton akumulitan de la tempo”
Hamilton, The Federalist

Oni povas ricevi la Bultenon en papera formo fariĝante “simpatianto de EEU”, per sendo de kontribuo de almenaŭ 20 • jare al la UEA-konto **eece-p**
TTT-ejo de EEU: <http://lingvo.org/eo.html>

ATENTU: ekde la venonta numero la bulteno estos redaktata kaj dissendata de la Brusela Komunikad-Centro <komunikadcentro@esperanto.org>, al kiu oni sendu ĉiujn komunikojn ĉi-rilatajn.

E E U - I N F O R M I L O

La verona kongreso malfermiĝis la 24an de aŭgusto per parolado de prof-ro Humphrey Tonkin, kies kompletan tekston ni redonas.

INAŬGURA PAROLADO

Kvina Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso, 24an de aŭgusto 2002

Efektiva lingva egaleco, rajto de la eŭropanoj

Humphrey Tonkin

Kiam antaŭ multaj jaroj oni komencis sisteme enkonduki la francan lingvon kiel la lingvon de la registaro en Kebekio, venis multaj protestoj de la anglalingvanoj. Kial oni volas ŝanĝi la konduton de la homoj per leĝoj, oni demandis? Ĉu oni ne komprenas, ke tiel intimaj aferoj kiel la utiligo de lingvoj ne estas ŝanĝeblaj per leĝoj? Kaj se oni protektas la lingvon parolatan de la franclingvanoj, kial oni ne protektas la lingvon parolatan de la anglalingvanoj?

Pasis jam trideko da jaroj depost la komenco de la lingvaj disputoj en Kebekio. Unu aferon oni lernis frue en

tiuj disputoj: leĝojn oni bezonas por ŝirmi la malfortajn, ne por konfirmi la povon de la fortaj; lingvopolitikon oni bezonas ne por subteni la jam ekzistantajn privilegiojn, sed por doni rajtojn, al tiuj, kiuj antaŭe ne ĝuis ilin.

En Kebekio hodiaŭ la lingva situacio estas nerekoniebla alia ol ĝi estis antaŭ kvindek jaroj. La franclingva majoritato ne nur havas pli vastajn rajtojn al egala edukado en la propra lingvo aŭ al aliro al la registaro aŭ al aliro de la sistemo de justico, sed ĝi ankaŭ povas ĝui la franclingvan kulturon en esence franclingva medio. Kun la franca lingvo venis ekonomia prospero por multaj franclingvanoj, kaj venis ankaŭ sento, ke la franca kulturo ne plu konsistigas en la kanada kunteksto ian provincan kulturon utilan nur por kermesoj kaj sanktulaj festoj, sed alirejon al la mondo, pordon al la propra fiera heredaĵo.

Similajn nociojn pri la senutilo de novaj leĝoj oni esprimis pri leĝoj kontraŭ rasa diskriminacio en Usono en la 1950aj kaj 1960aj jaroj. Kiel oni povas ŝanĝi la korojn de la homoj per ŝanĝo de la leĝoj? Kiel oni povas krei toleron per ŝajna jura maltolero? Sed homo, kiu revenus al Usono post kvindek jaroj da foresto trovos mondon ŝanĝitan: pli da nigruloj kun universitataj diplomoj, en influaj pozicioj en grandaj entreprenoj, en registaraj postenoj, inter advokatoj, kuracistoj, juĝistoj.

Similajn aferojn oni diris pri leĝoj kontraŭ diskriminacio ĉe virinoj en multaj landoj, sed ili rezultigis notindan progreson en la socia kaj ekonomia situo de virinoj.

Hodiaŭ, en Eŭropo, same kiel en Kebekio antaŭ trideko da jaroj, oni riskas sekvi similan vojon kiam temas pri la lingvouzo. Malgraŭ tio, ke *ene de* preskaŭ ĉiu lando de la Eŭropa Unio ekzistas leĝoj pli aŭ malpli efikaj por protekti la lingvajn rajtojn de minoritatoj, la starigo de racia lingva politiko *inter* la eŭropaj ŝtatoj restas ridinde malalta prioritato. La nuna praktiko, laŭ kiu teorie ĉiu lingvo de la ŝtatoj-membroj estas traktata egale (kvankam en praktiko kelkaj lingvoj estas pli egalaj ol aliaj), ne nur ne funkcias adekvate, sed estas ofte ignorata en la praktiko. Vane la malgrandaj landoj protestas, ĉar ĉiu ja scias, ke ili kapablas elturniĝi pere de la angla lingvo en kazoj de vera urĝo – kaj finfine lingvoj en tiu medio estas rigardataj kiel nuraj instrumentoj de komunikado, kelkaj el kies modeloj funkcias pli bone ol aliaj modeloj. Vane la malgrandaj landoj pledas por pli da lingva egaleco kiam la investitaj interesoj de la grandaj ŝtatoj efike baras al ili la vojon.

Se nur temus pri tio, ke, malgraŭ la reguloj kaj principoj de lingva egaleco en la instancoj de la Eŭropa Unio, la grandaj lingvoj sukcesas regi en la kunvenejoj kaj koridoroj de la eŭropaj institucioj, oni eventuale plendus, sed malmulton perdis. Sed verdire la manko de prestiĝo kaj povo de la malgrandaj lingvoj etendiĝas al multaj aliaj medioj. Malfacile danlingva aŭ nederlandlingva verkisto sukcesas konkurenci kun tiuj de la grandaj lingvoj; malfacile la eldona industrio, la filma industrio, la teatro, kaj preskaŭ ĉiuj aliaj formoj de homa arta esprimiĝo, sukcesas plue vivi sub la konstanta inundo de kulturaj produktoj el pli grandaj landoj. Rigardu foje la legajojn en nederlanda trajno aŭ en dana flughaveno: pli kaj pli oni legas siajn romanojn en la angla lingvo, kaj pli kaj pli la prezoj de danaj kulturaj produktoj altiĝas nekonkurencipove. Kaj se en Francio aŭ Germanio oni legas ĉefe en la franca kaj germana lingvoj, konsterne ofte la verkoj, kiujn oni legas, estas tradukoj el la angla: eĉ la tielnomataj grandaj lingvoj komencas cedi sian sendependecon antaŭ la efikoj de la angla.

Jes, karaj kongresanoj, la ludo fundamente ŝanĝiĝas – kaj ĉefe pro la preskaŭ krima neglekto de la lingva problemo fare de la iom pli fortaj ŝtatoj. Antaŭ deko da jaroj, eblis argumenti, ke la danan (ekzemple) oni tamen ne povus plene utiligi ekzemple en la neformalaj intertraktoj en la sino de la Eŭropa Unio, ĉar finfine temas pri lingvo apenaŭ uzata ekster ĝia propra lando; simile oni povis argumenti pri la greka aŭ la nederlanda. Necesis, ke tamen la parolantoj de tiuj lingvoj akiru scion de pli grandaj lingvoj. Antaŭ kvindek da jaroj, la danoj kaj nederlandanoj ofte lernis la francan aŭ la germanan por elturniĝi en internaciaj medioj – eĉ se la angla tamen estis plej populara. Sed hodiaŭ ne plu temas pri malgrandaj lingvoj kiel la dana aŭ nederlanda, kiuj estas devigataj cedi antaŭ grupo da potencaj lingvoj – la franca, la germana, la angla, eventuale la hispana, la itala: nun temas pri tio, ke la franca kaj germana kaj la aliaj perdas sian influon al unusola lingvo, nome la angla lingvo. La franca de hodiaŭ estas la dana de hieraŭ; la germana de hodiaŭ estas la nederlanda de hieraŭ, kaj ili iras similan vojon..

Malgraŭ tiu ĉi iompostioma forronĝiĝo de la pozicio de la franca kaj la germana, kaj de la aliaj grandaj lingvoj (krom la angla) en Eŭropo, la registaroj ankoraŭ ne plene komprenas la situacion. La angla lingvo kaj ties kulturaj produktoj – filmoj, televideo, muziko – rapide inundas iliajn kulturajn teritoriojn, tiel ke tutaj terenoj kie antaŭe regis la franca aŭ la germana estas nun koloniigataj de la angla lingvo – la scienco, ekzemple; la supera edukado ĝenerale; televida programado; komputila softvaro: temas pri preskaŭ senfina listo. Ne temas pri tio, ke unu *produktoserio* transprenas la antaŭe plurecan kulturan ekonomion, do ke la lingvo pli kaj pli puŝas alies kulturajn produktojn en marĝenan pozicion. Lingvo

egalas al potenco; potenco manifestiĝas en transpreno de la sendependeco, transpreno de la estetika libereco, kaj eĉ transpreno de la ekonomio.

Dum en Bruselo oni ignoras tiun ĉi problemon, ĝi iom post iom drivas al malavantaĝa solvo. Same kiel la anglalingvanoj de Montrealo rezistis la aplikon de leĝoj al demandoj lingvaj, aŭ la blankuloj de Alabamo rezistis la aplikon de leĝoj al demandoj rasaj, la parolantoj de la angla lingvo estas kontentaj lasi la nunan lingvan reĝimon en Bruselo kaj Strasburgo iri sian ĉiam pli diskriminacian vojon, en kiu la privilegioj de la malgrandaj lingvoj restas nur teoriaj en etoso, kiu ignoras la formalajn lingvajn principojn kaj pli kaj pli favoras la anglan. Jes, teorie la finna estas samrajta kun la franca, sed en la praktiko oni ne uzas la finnan en kunsidoj, en kiuj oni celas efektive konvinki la aliajn ĉeestantojn, interalie ĉar buĝetaj limigoj limigas la utiligon de interpretado el la finna entute.

Sed ĝuste pro la manko de influo de la malgrandaj lingvoj, la finnoj kaj grekoj kaj eĉ italoj fariĝas pli kaj pli kapablaj en la angla lingvo. La germanoj kaj la francoj nun devas rezisti ne nur la influon de la denaskaj parolantoj de la angla lingvo, sed tiun de la parolantoj de la malgrandaj lingvoj, kiuj jam rezignis pri la propraj lingvoj interalie ĉar la francoj kaj germanoj ne pretis defendi ilin. Tiel, do, la lingvoj de la dua rango estas nun minacataj de la angla unuflanke kaj de la bonaj uzantoj de la angla kiel dua lingvo (t.e. denaskaj parolantoj de malgrandaj lingvoj, kiuj bone ellernis la anglan) aliflanke.

La solvo al tiu ĉi problemo ne plu estas vanaj klopodoj insisti pri la lingvaj rajtoj de la francparolantoj aŭ germanparolantoj: tiun batalon oni jam perdis, kaj tiuj lingvoj fariĝas pli kaj pli regionaj, pli kaj pli neglektataj de insiste unulingvaj parolantoj de la angla. La sola ebleco kapabla konservi la Eŭropon de kultura diverseco estas sistema kunlaboro de ĉiuj partioj ĉirkaŭ solvoj, kiuj samtempe konservos la lingvan diversecon kaj transpontos ĝin tie kie tio necesos. Tiu solvo nepre devus enhavi la konscion, ke parolantoj de la angla lingvo lernu aliajn lingvojn. Esperanto, lingvo neŭtrala, post cent jaroj lingvo elprovata, komplete esprimiva kaj fleksebla, sidas tie antaŭ la nazoj de la solipsismaj batalantoj, kaj ili ĝin ignoras. Eble ili decidis, ke ankaŭ ĝi ne solvas ilian problemon – sed ili prefere faru tion surbaze de bona esplorado de ĝiaj kapabloj. Se la francoj aŭ germanoj komprenus, ke la plej bona vojo por konservi la aŭtonomion kaj influon de la propraj lingvoj estas limigo de la rolo kaj etendiĝo de la angla per subteno de neŭtrala solvo, ni finfine komencus trovi racian vojon el tiu ĉi hontinde unuflanka batalo.

Sed tiu situacio pozitiva ne ekestos se ni, la parolantoj de Esperanto, sidos kviete, samkiel la diversaj ŝtatoj sidas kviete, dum la angla transprenas la rolon de neegaleca, hegemonia, misglobalisma “solvo”. Samkiel la civitanoj de Kebekio antaŭ jardekoj komencis uzi la leĝojn, Eŭropo devus komenci konstrui lingvan reĝimon firme fundamentitan en logikan, justan kaj firman lingvopolitikon. Kaj la esperantistoj devas helpi mobilizi la publikon ĉirkaŭ tian politikon.

Tiu politiko ekestos tiam kiam la homoj komencos kredi, ke la lingvaj rajtoj estas same gravaj kiel ekzemple la rajtoj de virinoj, aŭ la civilaj rajtoj de la rasoj. En kelkaj landoj de Eŭropo, la lingvaj minoritatoj notinde sukcesis konservi sian vivkapblon kaj eĉ renversi jarcentojn da neglektiĝo. La landoj de Eŭropo devas kompreni, ke, fronte al la britoj kaj irlandanoj, ili estas landoj kies lingvoj estas minoritataj lingvoj, kies strebo al vivo ne estas tiel malsimila al tiuj de la samia aŭ la kimra, la frisa aŭ la friula, en ties respektivaj landoj. Atencoj kontraŭ ilia lingva memstareco estas atencoj esence diskriminaciaj.

Kaj ĉu la esperantistoj estas pretaj kun siaj argumentoj? Danke al la financa subteno de UEA kaj de la salutinda praktika kaj financa kunlaboro de la landaj Esperanto-asocioj grupigitaj en la Eŭropa Esperanto-Unio, notinde intensiĝis la informa kaj publikrilata laboro en Bruselo pere de la nun starigata Komunikadcentro, kiu celas interveni pri Esperanto kaj lingvaj problemoj ĉe la instancoj de la Eŭropa Unio. Tiu nova evoluo estas miaopinie la plej signifa en jam kvardeko da jaroj da eŭropa agado. La landaj asocioj reprezentataj en tiu ĉi kongreso, kaj la aktivuloj en Bruselo kaj aliloke, interalie ĉi tie en Italio, meritas nian grandan laŭdon. La agresa interveno de la Komunikadcentro en la lingvajn aferojn de la EU, interalie por malhelpi lingvan diskriminacion, estas bona kaj ĝusta vojo: se oni ne konsciiĝos, ke lingva diskriminacio estas egale malakceptebla kiel aliaj formoj de diskriminacio, oni eĉ ne donos al la lingva problemo adekvatan atenton (kiel ni ja rimarkas en la nuna pasivo de la Bruselaj instancoj). Kaj se la ekzisto de la tielnomata Esperanto-solvo eĉ ne aperos sur la mensaj horizontoj de la Bruselaj influuloj, eĉ decido alfronti la lingvan problemon lasus Esperanton flanke.

Ĉu Esperanto pretas transpreni rolon en Eŭropo? Ĉu ni vere kuraĝas prezenti ĝin kiel solvon? Ni certe havus pli da kuraĝo se pli da eksterstarantoj registrus sian subtenon de nia laboro; kaj ni havus pli da kuraĝo se la lingvo mem estus tute preta kun sia faka terminologio kaj siaj profesiaj interpretistoj, tradukistoj kaj

Umberto Broccatelli.

Perspektivoj de la lingva demando en Eŭropa Unio

Estimataj kongresanoj,

en la programo estas antaŭvidita unu horo por tiu ĉi prelego, sed mi parolos tre pli mallonge. Parton de mia tempo mi transdonos al s-ro Zlatko Tišljarić, kiu prezentos al vi la demandon “Ĉu indas transformi Esperanton al eŭropa lingvo?”. Pro teknikaj misvojiĝoj ne eblis enmeti lian prelegon en la kongresan programon, sed ni volas tamen doni al vi la eblecon aŭskulti lian kontribuon.

La Europa Unio havis sian embrion en la Europa Komunumo de Karbo kaj Stalo, naskita en 1952, en kiu la membrostatoj estis nur ses, kaj la lingvoj nur kvar. Tiam la lingva demando sajnis esti ne tiel urga en la Komunumaj strukturoj. Eĉ ne estis malfacile trovi interpretistojn havantajn pasivan konon de tri lingvoj kaj do povantajn interpreti el fremda lingvo al la sia propra. La franca estis praktike akceptita kiel komuna laborlingvo.

Nun la Unio nombras 15 landojn kaj 11 oficialajn lingvojn. En la venontaj jaroj estas antaŭvidita la eniro en la Union de pliaj statoj kaj do la rapida kresko de la nombro de la lingvoj uzendaj. Ni ne parolos pri la kostoj nunaj kaj estontaj de la hodiaŭa sistemo kaj pri la malrapidigoj de ĝi kaŭzataj kaj kaŭzotaj en la laboroj de la instituciaj organoj, ĉar tiu ĉi temo estas sufiĉe konata.

Cetere la lingva problemo de Europa Unio ne sidas nur en la interno de la europaj instancoj. Ĝi rilatas al ĉiuj civitanoj de la Unio, al la bezono de ĉiu civitano povi interrilati kun alilingvaj civitanoj, ne nur en turisma kampo, sed ankaŭ en la politika kaj socia vivo, kiuj farigos pli kaj pli komunaj, krom en laboro, komerco, kulturo ktp..

La oficiala sinteno de la europaj instancoj fronte al la lingva demando estas politiko de kuragigo al la lernado de pluraj europaj lingvoj fare de la europaj civitanoj. Tiu ĉi politiko simple signifas ke en Europo du aŭ tri lingvoj estu pli gravaj ol la ceteraj kaj praktike ke unu el ili – la angla – rolu kiel europa *lingua franca*, nome komuna komunika lingvo. Estas ja klare ke se Europeanano devas lerni du fremdajn lingvojn, unu el tiuj lingvoj preskaŭ ĉiukaze estos la angla.

Tiu ĉi solvo, nome la angla kiel *lingua franca* de Europo, estas jam praktike akceptita de la naciaj kaj europaj instancoj, eĉ se oni ne ĉiam kuragas diri tion per klaraj vortoj.

Krom la fakto ke tiu solvo estas nepre diskriminacianta, la angla fakte estas la lingvo usona kaj akcepto de la angla kiel lingvo de Europo estas aparta aspekto de la akcepto de usona hegemonio ankaŭ en eksterlanda politiko.

Pro la sama kialo, pro kiu Eŭropo, dividita kaj senpova, ne plu estas, kaj malpli kaj malpli fariĝas subjekto de internacia politiko inda je tiu ĉi nomo, kaj esprimas rilate al Usono aŭ subjugitecan akceptemon aŭ senpovan rankoron, sammaniere, fronte al la pli kaj pli disbatanta agreso fare de la angla lingvo kontraŭ niaj lingvoj, la eŭropaj ŝtatoj, la homoj de la politiko kaj de la kulturo, kaj mem la lingvistoj reagis aŭ grumblante, kiel en Francio (tamen sen kapablo proponi validajn solvojn) aŭ – kiel plej ofte okazas aparte en Italio – plene adaptiĝante al la angla kaj ebenigante ĝian vojon.

Neniu vidas ke la radiko de la malsano estas politika kaj konsistas en la malforteco elsekvanta el la malunueco.

Ĉe daŭro de tia kreskanta malekvilibro rilate al Usono, estas fiziologie kaj senalternative ke la angla supervenku kaj koloniigu nin. La sola rimedo estas do politika kaj iras tra federacia unuiĝo de la kontinento – aŭ pli ĝuste, en la nuna situacio, de unua “malmola kerno” el ŝtatoj pretaj realigi ĝin – kiu reekvilibrigu la situacion, kaj restarigu interrilaton de substanca egaleco kaj igu Eŭropon subjekto de internacia politiko. Nur tiam, kaj ne pli frue, malfermiĝos reala ŝanco por Esperanto, kiu alie restos miraĝo.

Do, pri la perspektivoj de la lingva demando en Europa Unio, ni povas konkludi ke ili forte dependas de la maniero laŭ kiu evoluos Europa Unio mem.

E.U. nun havas komunan monunuon, sed ĝi ne havas komunan regadon de la ekonomio. Oni povas diri ke ĝia monunuco ne havas registaron, dum 12 naciaj registaroj ne havas monunuon. Tio ĉi estas malsana situacio, ĉar la rajto elmeti kaj regi la monon estas unu el la ĉefaj prerogativoj de stato.

Tio povas porti al krizoj.

Eĉ la plilargigo de la Unio, manke de plifortigo de ĝiaj politikaj strukturoj en demokrata maniero, povas endangerigi la stabilecon mem de la Unio. Manke de klara perspektivo al politika unueco, jam relevigas la

fantomoj de la makro- kaj mikro-naciismoj.

Manko de komuna ekstera politiko kaj de komuna defendo igos la Union pli kaj pli dependa de Usono. Kaj tio neeviteble havos konsekvencojn ankaŭ en la lingva kampo. Politika dependeco kunportas ankaŭ kulturan kaj lingvan dependecon.

Se E.U., kontraŭe, alprenos sian rolon en la mondo, ja kiel amiko sed ne kiel subulo de Usono, donante al si federacian strukturon, tio povos ankaŭ porti al nova autonoma lingvopolitiko, en kiu la solvo “planlingvo” povos trovi sian spacon.

La rolo de planlingvo, do de Esperanto, por unuigita Eŭropo ne estos nur tiu de komunikilo, sed ankaŭ tiu de lingva identigilo.

Sed pri tio parolos al vi s-ro Zlatko Tišljar.

* * *

Zlatko TIŠLJAR

Ĉu indas transformi Esperanton al eŭropa lingvo?” (resumo)

Se ni volas solvi la lingvan problemon en Eŭropo, ni kiel esperantistoj devas konfronti la problemon laŭ kiu Esperanto kiel eŭropa lingvo ĉesus esti internacia monda lingvo. Ĉu per tio ni oferas la bazan ideon por eŭropaj celoj (EU foje povus fariĝi nova monda potenco kiu batalus por siaj intereso, sekve ne por la tutmondaj intereso).

Elirante el mia antaŭa tezo, ke neniu lingvo estas kompleta se ĝi ne rolas en ambaŭ roloj: la komunika kaj la identeca, mi konstatas, ke Esperanto havas ambaŭ rolojn, ĉar krom ĝia komunika valoro ĝi havas fortan identecan rolon por esperantista “popolo”.

Same mi opinias ke al Eŭropa Unio ne mankas komunikado, ĉar ĝi ja komunikas (eble ne kontentige) per la tradukado kaj uzado de kelkaj grandaj komuniklingvoj kiel la angla, franca..., sed ĝi ne solvis sian identecan rilaton al eŭropa identeca lingvo, kiel ĉefa signo de grupa identeco. Ĝi devas elekti unu lingvon por si ne pro komunikado, sed por fortigi sian identecon kaj la nura maniero elekti lingvon por eŭropa identeco estas elekti neŭtralan lingvon, alikaze oni ne evoluigas sian identecon sed submetiĝas al grupo kies lingvon oni prenis. (Samkiel oni ne povis preni por komuna mono DEM, kvankam ĝi efektive ludis tiun rolon el financa vidpunkto, sed devis elekti neŭtralnoman eŭro.)

Mi kredas, ke oferi Esperanton por Eŭropa lingvo, fari ĝin eŭropa identeca lingvo kaj sekve forpreni de ĝi la rolon de la monda, indas. Indas pro tio, ke se EU ne sukcesos evoluigi sian identecon, ĝi disfalos post unua pli granda ekonomia krizo kaj tio signifos mondan militon kaj katastrofon. Do, se ni helpas fortigi EU, ni helpas la mondon. Krome, se Esperanto fariĝus eŭropa identeca lingvo, ĝi fariĝus la dua helplingvo de la mondo apud la angla, kiel unu el la du plej potencaj lingvoj komunikaj. Tiukaze la triaj landoj de aliaj kontinentoj povus por sia internacia uzo elekti unu el la du mondaj lingvoj; aŭ la anglan aŭ la eŭropan (Esperanton). Tre verŝajne tiukaze ĉiam pli da azianoj kaj aliaj elektus por tio la eŭropan, ĉar ĝi estus multe pli simpla por lerni, kaj oni gajnus la samon (literaturon, komerckontaktojn ktp).

* * *

LINGVA DEMOKRATIO KONTRAŬ LINGVA DISKRIMINACIO **resumo de la prelego de Claude Longue-Epée**

Klariginte siajn spertojn de esperantisto, aparte kun la politikistoj, parlamentanoj kaj diversaj oficialuloj, kun kiuj li estas en konstantaj rilatoj;

komentinte la PIV-ajn difinojn de la vortoj entenataj en la titolo de la prelego;

la preleganto analizas sinsekve:

- kie kaj sur kiuj batalkampoj ni devas barakti;
- kiu estas la diskriminaciantoj kontraŭbatalotaj;
- kiel ni batalu kaj venku.

La batalterenoj situas en entreprenoj kaj organizaĵoj diskriminacie daŭre dungantaj «Native English Speaking», malgraŭ oficiala (sed platoneca) kondamno de la Eŭropunia Komisiono.

Ili situas en tiu Komisiono mem, kiu trudas la anglan lingvon al la kandidataj ŝtatoj, kaj kiu favoras al la ununureco

de la angla por redakto de patentoj.

Ili situas en *Euroscola*, en kiu la parlamenta oficistaro decidis trudi nur du oficialajn lingvojn (la anglan kaj la francan preskaŭ ne uzata).

Ili situas ankaŭ en homoj aŭ organizaĵoj, kiuj sincere kontraŭfrontas la invadon de la angla, proponante pli malpli naciismajn solvojn.

La diskriminacioj, krom iuj entreprenoj, krom la Eŭropunia Komisiono, estas: Ĉu tiuj kiuj sin proklamas elitoj pro proksimuma regado de la angla ; ĉu tiuj naivuloj kiuj pasive konsideras la anglan jam definitive venkinta kaj kiuj sin ofertas al ties sencerbigo.

La preleganto opinias, ke la objektive demokrata solvo por Eŭropo, por la ŝtatoj, por ties civitanoj, estas fakte la institucia laŭĉarta Multlingvismo.

Sed plus neŭtrala nenacia komuna lingvo : Pontlingvo en internaciaj kunsidoj kaj debatoj ; propedeŭtiko en lernado de fremdaj lingvoj ; rekta senpera komunikilo, kia estas esperanto.

La armiloj de la lingva Demokratio kontraŭ la lingva Diskriminacio estas:

La sciigo kaj la priatentigo de ĉia diskriminacio al amakomunikiloj, aparte pere de la Brusela Komunikad-Centro de EEU.

La protesto kontraŭ ĉia diskriminacio, kion faris UEA en sia plendo al la medicianto Jacob Söderman.

La partopreno (prudenta kaj singarda sed aktiva) en organizaĵoj defendantaj la naciajn lingvojn.

La promocio de *Euroscola*, bildo de estonta Eŭropo kun kandidat-ŝtatoj.

La ofensiva agado al oficialaj instancoj pri edukado kaj klerigado, por promocii esperanton en ekzamenaj kaj instruaj programoj, kio postulas energian klopodadon kaj necesan kunlaboradon de la landaj asocioj.

* * *

LALABOROJDELAEEU-KOMITATO

Dum la kongreso okazis du laborkunvenoj de la komitato de EEU, en kiu ĉeestis reprezentantoj de Aŭstrio, Belgio, Finnlando, Francio, Germanio, Hispanio, Irlando, Italio, Nederlando, plus la sekretario de la Brusela Komunikad-Centro, David Ferguson.

Umberto Broccatelli raportis pri la agado farita en la lastaj du jaroj, post la kongreso de Ostendo. La ĉefa rezulto de tiu agado estas la fondo de la Brusela Komunikad-Centro, kunlabore kun UEA.

Hans ten Hagen raportis pri la financa situacio.

La Komitato elektis novan estraron de EEU. Ĉar la nuna statuto antaŭvidas “trojkon”, kiu elektas la prezidanton kaj la sekretariojn, sed ne diras eksplicite ke la sekretario estu membro de la trojko, oni decidi elekti tri membrojn de la trojko, plus la sekretario, kaj nomi tiun ĉi organon “estraro”. En venonta komitat-kunsido oni prezentos proponon pri konforma ŝanĝo de la statuto.

Do la nova estraro konsistas el:

Seán Ó Riain, prezidanto, <sean2suz@eircom.net>

Flory Witdoeckt, vic-prezidanto, <flory@witdoeckt.be>

Johann Derks, kasisto, <Derksesp@cs.com>;

Katinjo Fetes-Tosegi, sekretario, <roi.esperanto@orf.at>;

La hispana reprezentanto prezentis inviton de la Hispana Esperanto-Federacio organizi la venontan EEU-kongreson en la jaro 2004 en Hispanio, en BILBAO. La invito estis principe akceptita. Ĝin pli detale ekzamenos la komitato.

La franca reprezentanto sciigis ke en la jaro 2005, je la centjara datreveno de la unua universala kongreso de

Esperanto en Bulonjo-ĉe-Mar, oni aranĝos en tiu urbo gravan kunvenon, kunlabore kun UEA

La komitato detale diskutis pri teksto de rezoluci-propono, kiu estis prezentita en la ĝenerala publika kunveno kaj tie unuanime aprobita.

Jen la teksto de la rezolucio:

**Rezolucio de la 5a Kongreso
de Eŭropa Esperanto-Unio
(Verono, 23-28 Aŭgusto 2002)**

La 5a Eŭrop-Unia Kongreso, kunveninta en Verono (Italio) de la 23a ĝis la 28 de aŭgusto 2002, post ekzamenado de la nuna lingva situacio en Eŭropo, ankaŭ vide al la baldaŭ okazontaj plivastiĝoj de Eŭropa Unio, asertas la gravecon por Eŭropo, kaj la tuta mondo, de efektiva lingva egaleco kaj de protektado de lingva diverseco.

Plie, la Kongreso esprimas sian kompletan konsenton kun tiuj principoj de lingva egalrajteco kaj de protektado de lingva diverseco esprimataj en la diversaj naciaj, internaciaj kaj eŭropuniaj traktatoj kaj bazaj leĝoj, kaj specife en la Konkludoj de la Konsilio de Ministroj, kunvenintaj en Luksemburgo, la 12an de junio 1995 pri “Lingva Diverseco kaj Plurlingvismo en la Eŭropa Unio”, kaj konfirmitaj en januaro 2002.

La Kongreso devas tamen rimarkigi ke la lingva diskriminacio kaj malegaleco pli akriĝis en la lastaj jaroj, malgraŭ la laŭdindaj intencoj esprimataj en la diversaj traktatoj kaj bazaj leĝoj. Plie, ĝi notas ke kreskadas premado sur eŭropanoj ne nur por ke ili akceptu la ideon ke la komuna lingvo de Eŭropo estas jam la angla sed ankaŭ por ke ili investu multe da tempo kaj da mono por lerni la anglan. Malgraŭ tio estas elstare favorataj la civitanoj denaske anglalingvaj, ankaŭ en la aliro al laborpostenoj de eŭropaj organizaĵoj kaj entreprenoj.

Tial la Kongreso – ja agnoskante la gravecon, en multaj situacioj, de lernado de naciaj lingvoj – tamen rimarkigas ke por la plej multaj civitanoj estus ege utile havi komunan lingvon relative facile lerneblan kaj por neniu diskriminaciantan.

La Kongreso opinias – surbaze de la sperto akumulita dum pli ol cent jaroj – ke neŭtrala planlingvo, kia estas Esperanto, povus disponigi realan bazon por plifaciligi egalrajtan komunikadon inter eŭropanoj.

La Kongreso do invitas la Eŭropan Komisionon, kaj la naciajn registarojn en Eŭropo, plenumi, kiel eble plej baldaŭ, la volon esprimitan en la Konkludoj de la Konsilio de Ministroj en 1995 pri “Lingva Diverseco kaj Plurlingvismo”, kaj konfirmitan en januaro 2002, kaj starigi konstantan konferencon de naciaj reprezentantoj, spertuloj, kaj politikistoj, kiu esploru ĉiujn opciojn, inkluzive de tiu proponita de la internacia lingvo Esperanto, ankaŭ aranĝante laŭcelajn eksperimentojn.

Konklude, la Kongreso asertas ke la principo de reala fakta egalrajteco, ankaŭ lingva, inter ĉiuj civitanoj de la Unio, estas enskribenda en la konstitucian tekston, kiun la Konvencio estas preparanta kaj plej eble baldaŭ realigenda.

ALLARICEVANTOJ DE TIU ĈI BULTENO

Karaj legantoj,

ekde decembro 1999 mi redaktas tiun ĉi ret-bultenon, kiu havis la celon informi la esperantistojn pri la aktiveco de Eŭropa Esperanto-Unio kaj stimuli debaton pri eŭropaj temoj.

Nun, post la Verona kongreso, mi ne plu estas prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, kaj transdonas la laboron al aliaj pli junaj kaj pli fortaj aktivuloj.

Mi dankas ĉiujn pro la kunlaboro ricevita en tiuj ĉi jaroj kaj deziras al la nova estraro de EEU bonan laboron kaj

grandajn sukcesojn. Mi dankas la novan estraron pro la honoro al mi farita nomumante min “honora prezidento de EEU”.

La Bulteno estas nun transdonita al nia Brusela Komunikad-Centro, en la persono de David Ferguson (alinome Dafydd ap Fergus), kiu certe zorgos kaj renovigos ĝin.

Mi restas fidela al miaj idealoj eŭropa kaj esperanta kaj plu kunlaboros, kiam bezonate, en la limoj de miaj eblecoj.

Amikajn salutojn,

Umberto Broccatelli

En la retejo www.laboratorioeuropeo.it de la itala eŭrop-deputito Demetrio Volcic, aperas kelkaj eldonajoj pri eŭropaj temoj, inter kiuj antologio el dokumentoj pri la naskiĝo kaj evoluo de la eŭropaj institucioj ĝis la 60aj jaroj. La itala titolo estas ANTOLOGIA EUROPEA. Troviĝas ankaŭ slovena versio. Nun legeblas ankaŭ esperanta versio kun la titolo EŬROPA ANTOLOGIO, je la adreso:

<http://www.laboratorioeuropeo.it/pdf/antologiaeuropa.pdf>

La libro estas senpage elŝutebla. Legu ĝin kaj sendu gratulmesaĝojn al la retejo.

E Ŭ R O P A D E B A T O

Ni donas artikolon verkitan de Andrea Chiti-Batelli por la Verona kongreso, kiun oni ne povis legi tie.

Andrea Chiti-Batelli

KOMUNIKOPORLA VERONAKONGRESO

Laŭ mia opinio la vera kaj esenca tasko de Eŭropa Esperanto-Unio, aŭ pli ĝuste de ĉiuj subtenantoj de Esperanto, ne konsistas en tio ke oni ilustru ankoraŭfoje la kvalitojn de tiu ĉi lingvo, sed en tio ke oni indiku la rimedojn *ne iluziajn* por por ke ĝi povu sukcesi, kaj do ke oni *decideme agu konsekvence*.

Ĉi-rilate mi proponas al la esperantistoj radikalani ŝanĝon de ilia strategio – miaopinie nepre necesan por savi esperantismon el rapida dekadenco kaj enfermiĝo en si mem, jam okzantaj: veran kaj efektivan “kopernikan revolucion”, por adapti al la kazo esprimon de Kant.

Tia “revolucio”, kiun mi proponas al la esperantistoj - kaj kiu estas miaopinie nepre kondiĉo de la savo de niaj lingvoj kaj kulturoj - povas jene resumiĝi.

Ne okazas ke lingvo, danke al siaj apartaj ecoj kiel komunika lingvo internacia, povas sukcese akiri tian rolon kaj do, por tiel diri, sin trudi al la politiko kaj unuigi la popolojn. Okazas, male, ke la politiko, danke al sia forto kaj al siaj institucioj, sukcesas altrudi lingvon - interne de iu ŝtato same kiel en internacia kampo - tute sendepende de ties kvalitoj. Estas tiel ke la angla lingvo sin trudadas ĉiutage pli kaj pli, minacante la pluvivadon mem de niaj lingvoj, kaj kun ili tiun de niaj kulturoj. Por preventi tian vivmedi-katastrofon lingvan kaj sukcesigi Esperanton, necesas do, antaŭe, vivi politikan povon, kiu de ĝi fariĝu la portanto (t.e. hodiaŭ, kiel unua paŝo, la Eŭropa Federacio).

Tio ĉi estas la revolucio, pri kiu de longa tempo estas bezonate ke ĝi okazu kaj ke ĝi firme stariĝu en la kapoj de la esperantistoj, ĝis nun tute surdaj al tiu veraĵo: per renversiĝo iel analoga al tiu, pri kiu Marx diris ke li plenumis ĝin rilate al la Hegela ideismo. Ne estas vere - se permesatas al ni tiu ĉi bildo - ke la altega kanta arto de Orfeo malŝlosas la pordojn de la inferoj kaj revivigas Eŭridicon. Tio estas nura ŝajnaĵo: en la realo la kruda forto de la infera dio venkobatas Orfeon, vantigas lian arton kaj liajn klopodojn kaj definitive reforprenas de li lian edzinon, refalegante ŝin en la mallumojn de la morto. Kontraŭ la forto la raci’ malvenkas: «la senarmaj profetoj

ruiniĝis» (laŭ Machiavelli).

* * *

Germana politik-sciencisto de la unua duono de la 20a jarcento, Wolfgang Abendroth, verkis antaŭ pluraj jardekoj eseon aparte valoran kun la titolo «La nepolitikeco kiel distinga trajto de la germana Universitato» (*Das Unpolitische als Wesensmerkmal der deutschen Universität*). La samo estas direnda hodiaŭ pri la esperantistoj, ĉiuj same ĝisradike «nepolitikaj», ĉu fideluloj, almenaŭ laŭvorte, al Zamenhof, ĉu sekvantoj de la «Manifesto de Raŭmo». Se ili ne kapablos liberigi sin, ja tute liberigi sin, je tiu sia totala «nepolitikeco» - kiu pludaŭris dum unu jarcento kaj ilin relegaciis kaj relegacias en ian Limbon, «necertaj, inter la vivo kaj la nenieco» - kaj ili ne anstataŭigas al ĝi kiel eble plej baldaŭ precizan elekton politikan kaj firman strategion konsekvence plenumatan, tiam ilia sorto estas skribita kaj Tazio Carlevaro, facila profeto, anticipe kantis ĝian *De profundis* (= mortokanton).

Nur poste, nur se oni kapablos plenumi tiun ĉi malfacilan kaj traŭmecan konvertiĝon, havos signifon paroli - konkrete, kaj ne vakue - pri defendo, danke al Esperanto, de la lingvoj kaj de la kulturoj de Eŭropo kaj de la mondo, pri disvolvigo de nova kulturo de la kunvivado kaj pri multkultureco, en renovigita kaj federita Eŭropo.

Tiu ĉi do, denove emfazende, estas la politika elekto - la «defio», kiel oni diras en la angla lingvo - por kiu la esperantistoj estas vokataj aktive batali: la plena realigo de la Eŭropa Federacio; kiu sola, hodiaŭ, povos konsistigi la firman starpunkton politikan - ĝis nun tute mankantan - sur kiu oni apogu sin por igi Esperanton la oficialan federacian lingvon de Eŭropo, unua paŝo por ke ĝi povu poste akiri la rolon de tutplaneda komunika lingvo.

Eliri el la rozkoloraj revoj kaj el la «kasteloj en Hispanio», kiel dirus la francoj, kaj eniri en la mezon de la aferoj de la malmola politika konfrontado: tio ĉi estas la vetaĵo. Kaj “se ne, tiam ne”, ni diros kun Mazzini.

* * *

BIBLIOGRAFIO

Mi liveris vastan bibliografion en mia volumo *La politica d'insegnamento delle lingue nella Comunità Europea. Stato attuale e prospettive future*, Roma, Armando, 1988; kaj, pri la kultura parto, en mia volumo *Europa delle culture e Europa delle lingue*, Manduria, Lacaita, 2000 (aĉetebblaj ĉe Itala E-Federacio en Milano).

En Esperanto oni povas trovi pli vastan traktadon de la supraj temoj en la kajeroj eldonitaj de UEA, aĉetebblaj per la UEA-libroservo.

Politika hegemonio kaj lingva hegemonio en Eŭropo. A. Chiti-Batelli, P. Janton. Trad. U. Broccatelli. Rotterdam, 1995. 19p. 21 cm.

Por politiko de Esperanto. A. Chiti-Batelli. Trad. U. Broccatelli. Rotterdam, 1997. 23p. 21 cm. Pledo por tuja ekago kontraŭ lingva hegemonio.

Tutmondiĝo kaj internacia lingvo. Ĉu oportuna ĉu unika - aŭ favora ĉu maltrifita? A. Chiti-Batelli. Trad. U. Broccatelli. Romo, 1999. 10p.

Zamenhof, hodiaŭ. A. Chiti-Batelli. Trad. U. Broccatelli. Rotterdam, 1999. 20p. 21 cm. Provo aktualigi la homaranismon sur lingvoproblema kampo. Diskutkajero 3.

lingvoinstruistoj. Plia tasko de la Brusela Centro ja estas varbi la subtenon de eksterstarantoj, interalie de politikistoj, universitatoj, edukistoj, lingvistoj. La Brusela Centro ankaŭ povus helpi konsciigi nin pri la neceso multe pli agreseme kaj diligente evoluigi nian propran lingvon, tiel ke ĝi plene pretu por la rolo, kiun ni antaŭvidas.

Mi esperas, ke la eŭropaj landaj asocioj daŭrigos sian subtenon al tiu vere eksterordinara iniciato. Raporto de la Centro en junio citas tutan liston da sukcesaj lokigoj de artikoloj en gazetojn en diversaj partoj de la mondo kaj longan serion da reagoj al aliaj tiaj artikoloj. La progreso de la Centro jam konvinkis unu grandan donacanton al UEA doni monon por reklama iniciato en Bruselo. Mi ne dubas, ke sekvos pliaj sukcesoj se oni efike kunlaboros por sukcesi la Centron.

Sed tio dependos interalie de la aktiva kunlaboro de la homoj ĉirkaŭ la Centro – en Bruselo kaj Belgio ĝenerale, sed ankaŭ en la diversaj landaj asocioj, kaj en UEA. Ofte niaj iniciatoj forvelkas aŭ stumblas ne pro manko de mono aŭ manko de ideoj, sed pro manko de kunlaboro, manko de la spirito de kompromiso. Mi esperas, ke tiu ĉi nova eŭropa iniciato ne perdos sian impeton pro nia nekapablo organizi nin por efike ekspluati la bonajn okazojn por prezenti niajn argumentojn, kiuj malfermiĝas antaŭ ni.

Precize tia hezitemo, tia manko de kunlaboro, tia prefero ne veni al firma interkonsento aflikta la diversajn membrojn de la Eŭropa Unio. Se vere la diversaj nacioj volas konservi la Eŭropon de la kulturoj, ili aŭskultu la mesaĝon interalie de ni esperantistoj, kiuj jam de pli ol unu jarcento praktikas komunikadon kiu unuecigas la homojn en spirito de egaleco kaj konservas la lokan kaj regionan kulturecon. Ĉu eta bando de utopiistoj aŭ antaŭanoncantoj de la nova Eŭropo? Tiu elekto, karaj kongresanoj, restas ĉefe ĉe ni. Ni ne hezitu antaŭ tiu nova kaj unika defio.